

Leterkesto

Claude Gacond, 429-a radioprelego, 1971.12.29 & 1972.01.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por esprimi agrablan novan jaron al niaj geaŭdantoj ni malfermas nian leterujon, en kiu nun troviĝas salutvortoj venintaj el 18 eŭropaj landoj : Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj Okcidenta kaj Orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Portugalio, Svedio kaj Svislando.

A.- Multaj geaŭdantoj ŝatis nian prelegaron pri la verko *Interpopola Konduto* de Edmond Privat. Inter ili doktoro Salvatore Fiorentin en Padova, Italio, sinjoro Pimenta en Povo, Portugalio, doktoro Kondor en Lampertheim, Germanio Okcidenta, sinjoro Dumarquez en Anzin St. Aubin, Francio, sinjoro Brans en Veghel, Nederlando, gesinjoroj Iva kaj Lennart Aberg en Gotenburgo, Svedio, gesinjoroj Najbaro en Keighley, Britio, kiuj esprimis la deziron ricevi la tekston de la prelego, kie ni prezentis dirojn de Edmond Privat pri nia lingvo internacia Esperanto.

Cl.- Tiun tekston ni aperigis en cirkulera letero, kiun ni dissendis al ĉiuj geaŭdantoj, kies leteroj troviĝis en nia leterujo. Sed por respondi al ĝenerala deziro ni hodiaŭ relegas al vi parton el tiu elsendo, kaj geaŭdantoj, kiuj ne ricevis la menciitan cirkuleron kaj dezirus relegi tiun belan priskribon pri esperanto, tiuj tuj skribu al ni, kaj ni dissendos al ili la restantan stokon de tiu novjara cirkulero.

A.- Jen ni legas al vi dirojn de Edmond Privat el la libro *Interpopola Konduto* :

Cl.- *La sopiro al tolerema kaj federacia mondo ja bezonis esprimilon. Troviĝis Esperanto kaj utiliĝis kiel kanalo. Al la lingvo mem tiu fluo donis forton kaj vivon. La filozofia etiko de Zamenhof revenis en formo de popola sento. Liajn malnovajn broŝurojn pri **homaranismo** jam neniu legas. Nur la lingviston oni konas. Tamen ĝusta sin montris lia kalkulo. Lingvo disvastigas atmosferon. Samtempe ĝi logas al si ĉian sopiron komunan.*

A.- *La sperto pri Esperanto kuŝas en tio, ke ĝi ebligis disfloriĝon de tiu fluganta sento, kiu bezonis esprimilon. La naskiĝanta kredo je unueco en diverseco, la homaro ekkonscia pri si mem samtempe fidela al la naciaj valoroj, riĉaj je ĉarmo kaj koloro, jen tio, kio donis al Esperanto flugilojn kaj karakteron. Sen ia mistiko enkorpigota, neniam ĝi estus mem fariĝinta lingvo vivanta, kapabla servi al parolantoj por entuziasmigi aŭdantaron kaj rabi ties ploron aŭ rideton.*

Cl.- *Tiu sperto vekas la scivolemon de lingvosciencistoj penantaj ekzameni la faktojn, sed ĝi eĉ pli multe interesas psikologojn kaj etikistojn, kiuj esploris arajn mentalecojn. En la **interna ideo** de la esperantista mondo ili vidas kristaliĝon de tiu religia sento, kiu mankas al la Ligo de Nacioj. En la lernejoj Esperanto montriĝis katekismo pli vivanta kaj pri efika ol diplomataj aŭ juraj formuloj.*

A.- *Tiu sento estas tute malsama ol la klaskonscio kompreneble multe pli potenca en la mondo. La laborista internaciismo devenis el batalo por socia egaleco. Malsimile esperantismo naskiĝis el simpatio kaj scivolemo pri la nacia vivo de la ceteraj popoloj, speciale la malgrandaj. Ĝi entenas la plezuron ilin koni kaj ilin trovi amindaj, ankaŭ la ĝojon konigi al ili la valorojn de la propra patrujo kaj plie ĝui siavice la fakton, ke tio plaĉas al ili.*

Cl.- *El tio sekvas amikeco gajema kaj ia sento pri unueco kultura. Britoj, francoj, germanoj, ĉinoj aŭ poloj estas fine nur homoj, ĉiuj kun similaj zorgoj. Kune oni ŝatus vivi pace. Kian kutimon disvastigas Esperanto, tio estas fidema egaleco kaj reciproka respekto : ĉiuj nacioj kun egala rajto, neniu trudanta sian lingvon al la ceteraj, sed ĉiu konservanta ĝin interne de siaj landlimoj.*

Leterkesto

Claude Gacond, 429-a radioprelego, 1971.12.29 & 1972.01.01

A.- *Kio ĉefe impresas, skribis Inazo Nitobe, la japana senatano, kiu reprezentis la Ligon de Nacioj al pluraj Esperanto-Kongresoj, tio estas la unuanima egaleca aspekto de tiuj kunvenoj pro la uzo de unu komuna lingvo neŭtrala.*

Cl.- *El tiaj akiritaj kutimoj formiĝas novaj moroj de interpopola konduto. Sed la plej forta rezultato, sur tiu limigita kampo, estas la sento, kiu disvastiĝis.*

A.- *El sentoj vivas la homaro multe pli ol ĝi vivas el racia pripensado.*

Cl.- Fino de la citaĵo.

A.- En nia leterujo ni trovis salutojn de personoj, kiujn ni renkontis okaze de esperanto-renkontiĝoj.

Cl.- Fraŭlinoj Jacqueline kaj Paulette Chefdhomme en Dax, Francio, siatempe restadis en Adelboden en unu el la tradiciaj Esperantistaj Skiferioj. Kaj ili konservas rememoron pri la fondua vespero. Al tiuj du iamaj skiemuloj ni diras niajn plej korajn bondezirojn.

A.- Fonduo estas tipe svisa manĝo. En kakelono, tio estas tera kaserolo, miksiĝas kuirante blanka vino kaj fromaĝo. Tiun kremon ĉiuj ĉeestantoj manĝas per paneroj fiksitaj al forkoj el sama ujo. Tio vekas tute apartan atmosferon, kiun bone konas la japanoj, kiuj ofte manĝas el la sama kaserolo. Tion diris al ni japanaj gastoj, kiuj ĉiuj multe ŝatis fonduon.

Cl.- El Britio skribis Sonja Catling-Brun en Bristol, kiun ni ofte renkontis okaze de semajnfinoj de Esperanto-Junularo de Svislando. Samtempe ni lernis esperanton, ĝin praktikante okaze de variaj manifestacioj, kiujn ni laŭvice aranĝis. Dum ni restis en Svislando, Sonja Brun edziniĝis kun brito kaj iĝis Sonja Catling-Brun. Kun sia edzo ŝi formas unu el la esperanto-paroj. Aŭdu ŝin : *Mia edzo kaj mi ĉiam interparolas esperantlingve, ne nur vendrede, kiel vi provis fari ĉe la komenco de via geedzeco ! Sed inter ni ja ne ekzistas komuna gepatra lingvo.*

A.- La venontan semajnon ni remalfermos nian leterujon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-